

Torĉo de la paco

Internacia lingvo estas nature ligata kun internacia vivo kaj sekve de tio kun internacia politiko. Oni eĉ povas diri, ke ĝi pograde fariĝos ĉiam pli uzebla ilo en la politikaj aferoj, precipe en tiuj, koncernantaj homaron ĝenerale. Jam la unuaj pioniroj ĉirkaŭ Zamenhof fiere portis la titolon de "pacaj batalantoj", revinte pri interna ideo de movado, kiu per lingvistika unuigo senarmigos la mondon "eterne militantan". Tamen dufoje post apero de Esperanto la popoloj vidis ruinojn de siaj urboj, malgraŭ ĉiuj pacifismaj revoj de bonkoraj idealistoj. Sed unu heredaĵo restis el tiu sonĝa tempo: PACO. Kredo kaj espero de simplaj homoj el ĉiuj popoloj, esprimata per unu vorto komprenebla tutmonde. Du mondmilitoj detruis iluziojn pri paco per interkompreniĝo kaj amo homaranisma. La vorto PACO ricevis novan sencon, kiu estas multe pli reala.

Realeco de tiu nova senco havas radikon en evento fermanta la unuan mondotragedion de nia jarcento: kiel infano, en doloroj de la granda milito, naskiĝis la socialisma revolucio. Pasis jaroj kaj la infano kreskis, maturiĝis kaj fariĝis plenaĝa, forta kaj sperta. Kiel realigo de la legendaj herooj el ĉiuj popolaj fabeloj de la mondo, ĝi iras nun sur la terĝlobo kaj rompas jugojn de sklaveco, kie ajn ili ankoraŭ konserviĝis. Neniu povas jam haltigi ĝin en ĝia grandioza marŝo. Trafe diris kamarado Ĥruŝĉov: "Se vi ne sukcesis murdi la infanon, kiamaniere vi esperas murdi ĝin nun, kiam ĝi fariĝis matura viro en plena forto?"

La jaro 1960 ardas per helaj ciferoj super la nigra kontinento - Afriko, kies popoloj akiris liberecon post longa periodo de sklaveco. La kolonia sistemo disfalas kiel subakvigita domo. La ĉijara ĝenerala kunsido de UNO kun partopreno de ĉefaj funkciuloj de ŝtatoj montris, ke hodiaŭ ne plu ekzistas monopolo de imperiismaj ŝtatoj en la monda organizaĵo. Eŭropanoj de Sovetunio pri ĝenerala kaj kompleta senarmigo akceptas jam ne nur la ŝtatoj de socialisma sistemo, sed ankaŭ la "neŭtralaj", novaj membroj de UNO, kiuj kontraŭstaras la agresian politikon de imperiismaj paktoj. Sed en la epoko de konstanta kreskado de socialisma sistemo kaj samtempa disfalo de imperiismo ekzistas granda danĝero. La imperiistoj ne forlasos siajn ĝisnunajn poziciojn memvole. Sekve de tio staras hodiaŭ kuraĝa insulo Kuba apud la bordo de Usono en senpera danĝero de atako. Pro tio en Alĝerio fluas sango de patriotoj, batalantaj jam ses jaroj en nacia liberiga armeo. Tial en Eŭropo oni armigas la plej spertan agresoron, germanan revenĝismon, per atomaj rakedoj. Nur 15 jaroj pasis post la lasta mondmilito, "perdita milito", kiel ĝin nomas faŝistoj, kaj denove ŝtalbaronoj sur Rejno minacas per ekmarŝo orienten.

Esperantistoj jam faris sperton pri tiuspeca ekmarŝo kaj ili ne povas esti neŭtralaj, kiam novifaŝismo revivigas en Eŭropo. Ne, paco ne plu estas vorto ornamita per rozoj kaj verdaj insignoj. Paco estas torĉo kun insignoj de socialismo kaj ni ĉiuj portas ĝin dum ĉijara aŭtuno 4-3-jaraĝan, lumantan survoje al kosmo.

jmh

ESPERANTA KLUBO EN PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 1, Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.

PROGRAMO DE LA KUNVENOJ

02 EK en Praha /por la du lastaj monatoj en la jaro 1960/

2.11. S. HESAPĈIEV /Sofio/: Promeno tra la lando de rozoj kaj de Georgo Dimitrov

9.11. Granda oktobra socialisma revolucio - la komenco de nova epoko /programo de junularo, respondas s-ano Kníchal/

16.11. PRAŽÁK-MAŘÍK : Somera Esperanto-Tendaro en Lančov /teksto kaj diapozitivaj: V.Novobilský/

23.11. a/ L.K. Tolstoj kaj lia rilato al Esperanto /okaze de la 30-a morto-datreveno/; b/ el la historio de la popo- lo ĉirkaŭ la Meza Volgo/ samideano Hebký/

30.11. ŠUSTR: El la historio de la domo "Ĉe la Nigra Elefanto", sid-ejo de la esp. biblioteko

7.12. BARTOŠÍK: La vivo kaj verko de František Omelka

14.12. D-ro S. HEŘMAN: El miaj vojaĝoj tra Eŭropo kaj Azio

21.12. KYNČL: La vivo de la popolo en Podkrkonoší en la tempo pasinta kaj nuna

28.12. SLANINA: Gaja vespero

RENKONTIĜO EN RÁJECKĚ TEPLICE

En tiu ĉarma banloko apud žilina okazis de la 17-a ĝis la 18-a de septembro esperantista renkontiĝo iniciatita de la Esg.Rondo en Žilina, kiun ĉeestis preskaŭ 100 personoj el kelk deko da lokoj /el nia klubo samideanoj: Mařík, Havlík, Josková/. La signifon de la kunveno substrekis kunsido de ĉeĥoslovaka Esp.-Komitato, samtempe tie okazinta kaj ĉeesto de reprezentantino de la ministerio de instruado kaj kulturo. Okazis diskutoj pri la aktiveco de esp. rondetoj.

LATVA SCIENCISTO AITE APREZAS ESPERANTON

Profesoro Janis Loja en Riga dediĉis en sia nova scienca verko "Valodniecibas pomatjautajumi" /Fundamentaj problemoj de lingvoscienco/

Tutan ĉapitron al "artefaritaj lingvoj kaj esperanto", en kiu li pravigas la ekziston de Esperanto kaj alte aprezas ĝian rolon en internaciaj rilatoj laŭ diversaj aspektoj /ekz. "Esperanto treege faciligas la interkompreniĝon en la landoj de Ekstrema Oriento"/. Profesoro Loja mencias ankaŭ la rilaton de V. I. Lenin al Esperanto kaj citas la nomojn de unuaj lingvosciencistoj en USSR, kiuj partoprenas la esp. movadon /S.Bokarev, L.Ĵirkov, Maltinskaja, V.Grigorjev en Moskvo, Sevak en Erevano, P.Ariste en Tartu kaj aliaj.

Osvětová beseda - Klube de esperantistoj en Hradec Králové eldonis kompletan ĉeĥan tradukon de tiu ĉapitro kiel 2-an numeron de siaj informhelpiloj. J.M.

D-ro Imre Ferenczy, eksprezidanto de Junulara Fako de Hungarlanda Esp. Konsilantaro, vizitis Olomouc por tie studi en la kliniko de internaj malsanoj, laŭ ĝia invito interesajn metodojn de terapio. Krom tio li paroladis en la Esp. Klubo kaj al juristoj en Rudý koutek ROH justičních zaměstnanců. En Příbor d-ro Ferenczy partoprenis solenan malfermon de mezlernejo kaj alparolis la gelernantojn. J.M.

SET-LANČOV /2-a etapo/

En la pasinta numero de nia Bulteno vi jam legis pri la 1-a etapo de nia Somera Esperanto-Tendaro /SET/ apud Lančov sur la bordo de Vranov-lago /18.7.-31.7./. Hodiaŭ ni raportos pri la 2-a etapo /1.8.-14.8./. En tiu ĉi etapo kunvenis kolektivo de pli ol 60 homoj el ĉiuj partoj de nia respubliko, inter ili unu aŭstro, laboranta en nia lando. Gramatikon, literaturon, historion kaj ideologion instruis gesamideanoj K.Franc, D.Kočvara, M.Lorková, M.Matušková, V.Novotný V.Podhradská, O.Schwetter en 4 kursoj /A,2B,C/. La tuta etapo estis filmita kaj pretan filmon vi vidos post iu tempo en viaj rondetoj. V.F.A.N.

TENDARA KARNAVALO

Mi ankoraŭfoje revenas al nia Somera Esperanto-Tendaro. Mi volus al vi rakonti ion pri nia tendara vivo, pre- cipe pri la amuzado. Amuziĝi en la tendaro oni povas diversmaniere; ekz. ekskursi en la cirkaŭaĵon, ludi volej- balon aŭ aliajn pilkludojn, serĉi fungojn en la arbaro ktp. Sed krom tiuj ĉi kutimaj, aŭ ni diru ordinaraj amuzoj ni entreprenis ion specialan.

Ni aranĝis karnavalon. Jes, karnavalon en naturo. Ĉu vi miras? Ja, ĉe ni esperantistoj estas ĉio ebla. Esper- antistaro estas popolo entreprenema. Do ni eĉ en pli malfacilaj kondiĉoj, ol ekzistas en la urbaj salonoj, kuraĝis aranĝi karnavalon. Kompreneble, ke kelkaj el ni, jam antaŭe informitaj, alportis el siaj hejmoj diversajn maskojn, sed plimulte da ĉeestantoj devis pretigi siajn maskojn el la naturaj fontoj. Precipe oni uzis grandan, longan herbon, arbobranĉetojn, muskon, filikon kaj similajn kreskaĵojn, krom la diversaj iloj tendaraj, precipe kuirejaj.

La karnavalo okazis dimanĉe, jam post unusemajna daŭro de la tendaro. Dimanĉe, post la bonega solena tagmanĝo kaj post iometa posttagmanĝa ripozo, ni komencis prepari niajn maskojn. La plimulto da preparoj okazis sekrete, por ke ĉiuj pli poste estu surprizitaj kaj devu diveni la portantojn de la maskoj. Kaj tio estis vere iam tre malfacila tasko. Povis eĉ okazi, ke vi ne divenis vian tendan kunloĝanton. Kaj kiujn maskojn ni havis? Mi citos nur kelkajn, kiel ekzemplon, ĉar tio vere ne estas ebla ĉion memori. Do la ĉefan senzacion kaŭzis nia negro, de ĉiuj tre primirata /pli poste ankaŭ bedaŭrata, ĉar oni ne povis lin purlavigi kaj fari el li denove plenan blankulon/. Plu vi povus vidi sankte aspektantan arbarviron kun ĉarmeta pierotineto aŭ tri gajajn muzikantojn eldonintaj strangajn sonojn el siaj kombiloj, du havajaninojn /alie niaj instruistinoj; tion mi divenis/, nian faman duon el la marioneta teatro, Spejbl kaj Hurvínek, ĉasiston, diversajn arbarbestojn, principon el la regno de fabeloj, mariston kaj diversajn aliajn figuretojn. Ĉiuj karnavalanoj kantis, kriis, dancis, saltis, ĉiu laŭ sia kapablo kaj eblo. Oni eĉ elpafadis de tempo al tempo diverskolorajn rakedojn. Do vere tie regis ĝusta karna- vala bruo kaj la tuta medio aspektis karnevale, ĉar eĉ nia enirpordego estis ornamita per diverskoloraj paper- rubandetoj. Kaj je la fino de nia gaj-furiozado ni invaziis la najbarajn infanajn tendarojn, kie nia arto festis plenan sukceson. Precipe ni sukcesis per niaj esperantaj kantetoj, dancado kaj kompreneble ĉefe per koloraj rakedoj. Eĉ okazis, ke nia rakedpafinto estis kaptita de la grupeto de infanoj, kiuj ne permesis al li foriri kaj reveni al nia tendaro. Poste li devis uzi la rakedpafilon kiel S.O.S. signalilo kaj ni rapidis lin "savi". Sed ĉio iam finas kaj same faris ni. Jam antaŭ vespermanĝo finiĝis nia sukcesplena karnavalo.

Kaj la rezulto? Ni denove konsciiĝis, ke la esperantistoj estas eterne junaj.

V.F.A.N.

LUMBILDOJ PRI SET

La Esp.Rondeto ĉe PKO en Ústl n.L. proponas prunti al esp. rondetoj serion de nigra-blankaj kaj koloraj diapozitivoj /5x5 cm/ pri la nunjara Somera Esp.-Tendaro kun akompana esp. teksto. Valora kompletigo por viaj programoj! Por kovri la elspezojn oni petas Kčs 15,- por ĉiu prunto. /La projekciilo kaj ekrano estas prunteblaj en ĉiu "Půjčovna prům. zboží"/La prunto okazos laŭ la vico de venintaj mendoj, kiujn adresu al: V, Novo- bilský. prom.chem.,Ústí n.Labem, Slavíkova 346.

J.M.

ESPERANTO EN LERNEJO

Ankau ĉi-jare komencis sian laboron esp. rondeto ĉe la mezlernejo en Praha, Smíchov, Vltavská strato. Ĝis nun aliĝis 12 gelernantoj kaj pluaj interesiĝas pri la kurso. La infanoj ne nur lernos la Internacian lingvon, sed ili planas vizitojn al la Esperantista Klubo en Praha, viziton al la biblioteko kaj atente legi la cirkuleron de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato "Zprávy". Post la unua semestro la gelernantoj intencas komenci korespondadon kun infanoj en diversaj landoj. La rondeton gvidas samideanino Milada Škodová.

D-ro PRAVOSLAV SÁDLO, virtuozo je violonĉelol, ŝatata membro de Esperantista Klubo en Praha koncertis dimanĉe la 2-an de oktobro 1960 dum vespera meso en la pregejo de s-ta Jakubo en Praha

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN SAMOPŜE

Sabato, la 3-an de septembro 1960, tago de nia alveno al Samopŝe, estis suna, freŝa kaj belega, kompare al tiuj tagoj, kiuj estis la tutan semajnon, pro tio ni, prahanoj, ĝoje envagoniĝis por forveturi tien. La unua agrabla surprizo atendis nin, kiam ni atingis Samopŝe. La belega, blanka, trietaĝa konstruaĵo de iama muelejo, situanta en verda valo, kiu estas ĉirkaŭata de ŝaumantaj kaj muĝantaj ondoj de la rivero Sázava, estis vere taŭga loko por la renkonton. La beleco de la naturo, la pureco de la aero kaj ĉefe la afableco de niaj kolinaj gastigintoj faris tiuj dutagan restadon agrabla rememoraĵo.

Posttagmeze alveturis preskaŭ cent gesamideanoj el 24 lokoj, krom ili el Praha partoprenis 34 personoj, venis ankaŭ gesamideanoj el Teplice, Plzeň, Litoměřice, Poděbrady, Pardubice, Havl. Brod, Ostrava kaj aliaj. Je la 20-a horo estis vespermanĝo, dum kiu multaj malnovaj konatuloj salutis sin reciproke, kaj ekis novaj interamikoj. Satiginte niajn stomakojn, ni ĉiuj iris al tendarfajro, kie ni kantis esperante, ĉeĥe kaj ruse. Poste ni revenis en la manĝejon, kie nin atendis la muzikistoj. Ĉi tie daŭris la arnuzo vespero per gaja dancado ĝis frumatenaj horoj. Oni dancis ĉion eblan, eĉ la mazurkon, ĉardaŝon kaj ankaŭ la "dancon kun balailo".

La duan tagon, dimanĉe, estis la ĉefa programo – laborkunsido, kiu daŭris de la 9-a horo matene ĝis la 15-a horo posttagmeze. Ke ĝi estis vere interesa, pruvas tio, ke ĉiuj senescepte restis ĝis la fino kaj multaj kontri- buis per bonaj konsiloj kaj proponoj. Unu el tre konvenaj proponoj estis: Organizati rilatojn inter rondetoj kun la celo interŝanĝi laborspertojn kaj instigi ĉiujn rondetojn por kolektiva kunlaborado, ke ne ekzistu izolitaj rondetoj.

Plua tre akceptinda propono estis kolektiva korespondado de rondetanoj, precipe kun popoldemokrataj landoj. Ni ĉiuj sentis, ke tiu malgranda rondeto en Kolín, kiu estis fondita en januaro 1960 kun 17 rondetanoj, nombrante nun jam pli ol 70 anoj, fariĝos unu al la plej gravaj rondoj en nia verda familio, se ĝi daŭrigos la bone komencitan vojon.

Kolinanoj, nur ek al la laboro! Montru al ĉiuj, kiel utila kaj fruktodona estas nia movado, kiel esperantistoj povas servi al la nobla celo de interfratiĝo de ĉiuj popoloj, servi por prifirmigo de la mondpaco, por feliĉo de la tuta homaro. Do ĝis la baldaŭa revido, kolinaj gesamideanoj! -jos-

Pri interesajoj, novaĵoj, nia kluba agado ktp. volas mallonge informi "VIVA GAZETO", dum kunvenoj en la Esperantista Klubo en Praha. Skribu al: Emil Rybinski, Lipová 12, Praha 2, Ĉeĥoslovakio.



En la centro de la Malnova Urbo de Praha, en domo nomata "Nigra Elefanto", troviĝas la biblioteko kaj studejo de la Esperantista Klubo en Praha. La malnova domo havas ĉirkaŭaĵon tiom antikvan, historian kaj pentrandan, ke vi vane serĉus similan en la tuta urbo.

Vane vi serĉus ankaŭ bildon de la elefanto, laŭ kiu la domo estas nomata. Dum la aliaj domoj konservis el la mezepoko sur siaj fasadoj bildojn aŭ skulptaĵojn, laŭ kiuj ili estas nomataj /ekz.: Ora Lilio, Blanka Kandel, Fera Pordo, Ruĝa Aglo aŭ En la Ĉielo/, la domo "Nigra Elefanto" ne plu havas sian signon jam de longaj jardekoj. Malnova, laŭaspekte kaduka, la domo formas angulon de la Strato Týnská kaj Strateto Týnská: sed ĝia ĉirkaŭaĵo estas tiom pentrinda kaj pitoreska, ke vere nur escepte vi ne renkontos ĉi tie pentriston aŭ fotografemulon, kiuj volas forporti tiun kuriozan lokon hejmen - almenaŭ sur bildo aŭ bildeto. Preteriranto ne povas ĉi tie ne halti. Kaj halti, tio jam signifas ĉirkaŭrigardi kaj per la okuloj karesi la restaĵojn de la malnovaj tempoj.

Haltu ankaŭ vi, kara leganto! Rigardu ĉirkaŭen kaj viaj pensoj vin fluge portos en la pasintecon. Foliumu kun mi en la historio de ĉi tiu loko. Ĝi estas kvazaŭ neelĉerpebla puto de historiaĵoj kaj legendoj. Antaŭ viaj okuloj aperados en paradoksa miksaĵo multaj historiaj scenoj de ĉiuj jarcentoj

per la naŭa komencante, ĝis la hodiaŭo! Elstaraj personoj de diversaj epokoj preterpasos kaj vi ree travivos kuriozajn eventojn, kiuj ĉi tie okazis. Vi admiros la malnovajn ŝtonajn dokumentojn, kies aĝoj nombras 500 ĝis 800 eĉ 1100 jarojn. Se la cirkaŭaĵo de la biblioteko de la Esperantista Klubo en Praha vin interesas, haltu! La tempo ankaŭ haltos, sed nur por momento, kaj jam ĝi ruliĝasreturnen. Spiro de la mezepoko vin ĉirkaŭos, blovo de pasintaj jarcentoj vin mirigos... preteriros staturoj, pri kiuj mi povus al vi multon dixi kaj rakonti: Jen Karolo la IV-a, reĝo nia karmemora - tie la famaj komponistoj: italo Tartini, virtuozo je violono, kun Padre Boemo Ĉernohorský, gvardiano de proksima monaĥejo. Ĉeĥa nobelo Václav Budovec z Budova, Ibrábim ben Jakub, la araba komercisto, la ŝtato prezidento Klement Gottwald, Karolo Škréta, la ĉeĥa pentristo de baroko, imperiestro Rudolfo la II-a kun sia kortego, Václav Čabelický de Soutice. Matěj Rejsek - la arkitekturo, sinjoro Berka de Dubá, reĝo Georgo de Poděbrady, ĉefepiskopo Jan Rokycana. Jan Jesenius, la fama kuracisto, la danoj Rozenkranc, Lange, Tycho de Brahe kaj aliaj. Gildo de ŝuistoj, gildo de pentristoj, la preĝejo de Dipatrino kaj la domoj kun nomoj: Ŝtona Tablo, Blanka Sonorilo, Lernejo de Rejsek, Nigra Cervo, Ora Ringo, Ungeld. Domo ĉe la Turkoj, palaco Granovski kaj multaj aliaj. Historio, rakontoj kaj legendoj abundas, kaj kompreneble - ankaŭ la fantomoj. En loko vere mirinda troviĝas la biblioteko de la Esperantista Klubo en Praha. Ni revenos ĉi tien en venontaj numeroj de nia Bulteno, se ili aperos!

NORDA PRISMO - Tiu ĉi tre bela kultura, socia, literatura revuo estas el la plej belaj de sia speco. La 4.a pa- sintjara numero alportas malnovskotan baladon "Tom la Rimisto" de Carl Loewe, en traduko de nia poeto Jiří Kořínek el Brno. En la sama kajero aperis originale poemo de nia membrino kaj poetino Eli Urbanová: "Amante", kaj teksto de festparolo de Paul Thorsen, dirita dum la 44-a Universala Kongreso en Varsovio, okaze de Belarta konkurso. En tiu konkurso, per arĝenta sprono de dana eldonejo KOKO estis honorigita la brava eldonisto de Ŝtafeto-libroj s-ro Juan Régulo Pérez. Ni atentigas, ke en la jaro 1953 kiel dua libro, kiun Ŝtafeto eldonis estis "Bapto de caro Vladimír" de K. H. Borovský en brila traduko de nia membro d-ro Tomáš Pumpr. - Romano en versoj "Amkonfeso al Henrieto" de nia poeto Karolo Pič, aperis en la 3-a kaj la 4-a numeroj. Kvina kajero alportas poemon, originale verkitan de Jiří Kořínek "Recepto", kaj sekvantan poemeton, kiun la sama diligenta poeto verkis omaĝe al Norda Prismo:

AL NORDA PRISMO

Al vi, béla revueto,
al vi, kara Norda Prismo,
volus nun kun helpopreto
veni mia altruismo.
Krom alia eblomanko
ankaŭ mia poŝ' malplenas,
kun saluto kaj kun danko
do nur miaj versoj venas.

En la recenzo verkita de Baldur Ragnarsson pri unika esearo "Lingvo kaj vivo" de Gaston Waringhien ni trovas mencion pri busto de Zamenhof, farita de ĉeĥa skulptisto Em. Kodet. La bildo de tiu busto, kies sola ilustraĵo ornamas la librojn tuj apud la titolpaĝo. Ni volas atentigi nian membraron, ke originalo de tiu busto ornamas nian bibliotekon en Strato Týnská.

- o O o -

PACO - N-ro 80-81 ĉeĥoslovaka eldono. Julio-aŭgusto 1960 - enhavas interesajn artikolojn kaj literaturajn kon- tribuaĵojn. El la riĉa enhavo ni menciuj artikolon de inĝ. Aleksej I. Verŝinin al Odesa "Se oni dronigus la armilaron en la maron", kiu evidentforme montras ekonomian absurdecon de armigado. Menciindaj estas internacie politika eseo "Afero de racio kaj bona moro" de J. E. Ambrož, redaktaro de la ĉeĥoslovaka eldono - artikolo pri esperantista porpaca movado inter ĉeĥoslovakaj geblinduloj, rakontaĵo de A. S. Nikitin pri V. I. Lenin "Ilustraĵo por la neverkita libro". Poezion reprezentas en tiu ĉi bela numero bonega traduko de "Balado pri okuloj de hejtisto" de Jiří Wolker, farita de Jiří Kořínek konsulte kun T. Pumpr. La numeron enkondukas la alvoko kaj ĝenerala deklaro de buroo de la Tutmonda packonsilantaro en Stockholmo, sub la titolo "La popoloj devas postuladi senarmigadon".

jmh

RECENZO "NUR TRI KOLOROJN" de ELI URBANOVÁ

Eble antaŭ dek jaroj venis en miajn manojn la unuaj poeziaĵoj de Eli Urbanová el Praha. Brilis en ili fajrero de talento. La aŭtorino ne hezitis akcepti kritikojn, ŝi studis la regulojn de la metio, la esperantan poetikon. La korespondado kun Julio Baghy multe akcelis ŝian artisman evoluon. Sed jam tiam montriĝis, ke ŝi estas spirito memstara, kiu ne multe ŝatas la banalaĵojn de la konvencio. Ŝiaj debutaj provaĵoj diskreskis en maturajn verkojn kaj ŝi baldaŭ prezentis siajn originalajn versaĵojn al la juĝo de la internaciaj literaturaj konkursoj. Tuj kun ekstera kaj rimarkinda sukceso. En la daŭro de tri jaroj 1952 ĝis 1954 ŝi rikoltis kvin internaciajn premiojn /du en Oslo, du en Zagreb kaj unu - la ĉefan premion - en Haarlem/.

Mi havis la raran okazon esti inicita en la plejparton de ŝiaj laboroj jam en la stadio de la manuskripto. Mi ne kaŝas, ke mi ne unufoje esprimis ankaŭ miajn dubojn aŭ malkontenton pri la temoj kaj ties formala traktado. Sed Eli sciis, kion si volas, kaj ŝi havis la motivon persisti ĉe siaj artismaj opinioj.

Kvankam la publikigo ŝajnis senŝanca, la manuskripto plimultigadis kaj baldaŭ igis videblaj konturoj de kelkaj diversternaj cikloj.

Nu, la talentoj de nia bela literaturo havas sian favoranton, kies meritojn por la kulturrado de la esp. beletro kaj poezio foje inde pritaksos la venontaj generacioj. Estas Juan Regulo Pérez en La Laguna, Kanariaj Insuloj. Li donis lokon al la parto de la verkaro de Eli Urbanová en la eldonejo Ŝtafeto /libroserio Beletraj kajeroj/. Do tie ĵus aperis ne granda, sed modele ekipita poemlibro de Eli Urbanová kun la titolo "Nur tri kolorojn" /140 paĝoj, kun portreto de la aŭtorino kaj kvar plumdesegnoj de Karel Oberthor. /La poetonon prezentas al la legantaro Julio Baghy kiel "karan fratino sur kamp' poezia".

El la ampleksa manuskripto de la aŭtorino estas ĉi tie elektitaj 64 poemoj, grupigitaj sub 9 kolektivaj titolojn, plus enkonduka poemo, laŭ kiu nomiĝis la tuta kolekto. Inter ili estas unu samtema kaj fermita ciklo "Hetajro dancas". Ŝi estas rimarkinda laŭ pluraj vidpunktoj. Du el la poemoj de tiu ĉi ciklo estis premiitaj en literatura konkurso. La formo de la poemoj estas tiu, kiun enkondukis en la poezion la unua greka poetino Sapfo. Tamen E. Urbanová ne uzas sian skemon en pure tempomezura formo, kiel Kalocsay, sed en formo akcenta, kiun ŝi kompanse pliriĉigas per rimornamo. La aŭtorino sciis adapti tiun ĉi "virinan versformon" por sia virina temaro kun granda sukceso.

Sed ŝia serĉemo kaj inventemo sciis por la liriko trovi ankaŭ tre variajn kaj nekutimajn vers-formojn kaj adekvatajn stil-rimedojn. Mi alte taksas tiajn senperajn, kvazaŭ konversacio simplajn versturnojn, kie estas multo alpensenda sub la vortŝpara dirmaniero kaj kie ankaŭ la paŭzoj, prisilentoj kaj interjekcioj ne estas nura garno de la linioj. Por montri la stilon de Urbanová, ni citu kvazaŭ hazarde elektitan fragmenton el telefona babilado kun amikino "Kiel vi fartas, animeto":

"...Do mi kolektis la kuraĝon.

Mi solvis tion telefone ...

Ja, animeto, mi esperas —

Mi petas? - Aha! Bone! - Bone!

ĉefe, ke vi min ne koleras.

Ah, animeĵ, vi diademo!

Vi aŭdus mian koron bati.

Dankegon por la toleremo!

Kaj ke ne ĉesis vi min ŝati,"

Per ŝparemaj rimedoj Eli Urbanová scias starigi kontrastojn, ripetante la situacion sub aliaj kondiĉoj /"Du demandoj"/, aŭ sumigante la ŝanĝiĝantajn emociojn en unusolan interjekcion. Komparu en la ĉi tie represita "Reveno", kie en unu silabo de refrena "ah" estas enhavata la sopirplena espero indigna konfuziĝo kaj malespera bedaŭro pro la perdo de la iluzioj. Tia estas la matura stilo de Eli Urbanová.

Kaj la spirita mondo de ŝia poezio estas ankaŭ memstara, sen baroj de la konvencio: intima virina liriko, konfeso de emocio, eĥoj de vivkataklismo /"mi blankulino kun animo hinda"/, kaj denove petolhumora observado, ludo de la fantazio /tre rimarkinda "Sorĉistino"/ kaj ankaŭ fabelaj babiladoj. Kaj estas jam tradicio de la esperantaj aŭtoroj, ke ili esprimas la omaĝon al tiuj, kiujn ili estimas. Ankaŭ tiaj poemoj troviĝas en la libro.

La freŝa verko de Eli Urbanová nin tre gojigis. Ankaŭ tial, ke ŝi estas unu el inter ni.

Reveno

"Je via sano!"
Oni festas.
Edzo denove
hejme estas.
Ŝi paŝis
en la koridoron
kaj sentas bati
sian koron
Ĉu li ne sidas
inter gastoj?
Kvazaŭ radius
ŝin du astroj,
aĥ!

Ĉiuj kapjesas:
„Bona vino!
Vivu sinjor’
kaj sinjorino!“
Okazis ĝuste
sub la lustro.
Nun li ŝin premus
sur la brusto!
Preterirante
kun rideto
li montras al ŝi -
bankbileton,
aĥ!

„Ĝis fund’, amikoj!“
Ora homo.
Sed kie restis
dam de l’ domo?
Tial li brilis pro feliĉo.
pro feliĉo.
Malgaje gapas
sur tapiŝon...
Kokosan. Ruĝan
kiel sango.
Kaj larmoj fluas
sur la vango,
aĥ!

Tomáš Pumpr

Klaĉema observanto: FINE ESTU LA LUMO!

Esperantistoj jam sufiĉe longe asertas: Esperanto estas facila lingvo, lernebla eĉ de simpluloj, ĝi estas lingvo demokrata. Bone, mi konsensus - sed - jes, sed la eminentuloj, ĉu ili uzu la saman facilan idiomon? Ĉu ankaŭ tiuj, kiuj havas en la poŝo la plej altajn studatestojn parolu kiel ordinara samideanoj simplan Zamenhofan Esperanton? Mi demandas: Kie estas lingva scienco, se ĉiu la lingvon komprenas? Ĉu klara lingvo estas scienca? Ne, milfoje ne! Feliĉe Esperanto estas tiel fleksebla kaj dank' al neologismoj oni povas perĝigi tute science paroli.

Kial aserti, ke Esperanto havas nur du kazojn: nominativon kaj akuzativon. La afero estas tute alia. La relativaj kaj demonstrativaj /vi konas ja la tabelon de korelativoj/ havas ja kvar kazojn; nominativo: kiu, kio, tio; akuzativo: kiun, tiun, kion, tion; genitivo: kies, ties; prepozicio: je kiu, je tiu, je kio, je tio. Ĝis nun la simpla esperantisto pri tiu ĝi fenomeno ne sciis. Oni kredis, ke laŭ fundamento la prepozicioj restas en Esperanto pre- pozicioj kaj per ili oni ne faras kazojn, ke korelativoj estas vortoj kaj la posedaj korelativoj - kies, ties, ne estas derivitaj de - kiu, tiu, kio, tio, oni komprenis, ke Esperanto estas klara, simpla esprimilo. Devis veni la lingvosciencistoj kaj gramatikon sekcii /supra „bildo“ estas nur malgranda fragmento de la „sekcio“/

Nu, ni esperu, ke venos feliĉa tago, kiam Esperanto estos tiom malfacila, kiel naciaj lingvoj, kaj tiam ĝi fariĝos vere demokrata inter ili.

Jen malgranda ekzemplo:

POLTRONA FEMINO – /acerba humoro/

Vespero obskuras. Adoleska, rustike vestita dina femino descendas haste la ŝtuparon de burgo. Ŝi estas jam in- fre sur pado. Friga gelo faris duran vojon, kiu antaŭ tri tagoj kotozis ... Diste en vilaĝo hojlas hundo.

Kvankam la vojo kurtas, en obskuro ŝi tristoas.

Lantas la tempo, kvankam ŝi hastas. Subite de dorson ŝi aŭdas feblajn paŝojn. Ŝi pli hastas, sed ho, ve, la ĝartero infras, ŝi devas halti.

Alhastas ŝvithumida, magra maskulo. Enorma nazo en lia turpa vizaĝo.

"Estas obskure", li diras, "licu vin akompani. Ne timu, mi estas jam olda" kaj proponas la polmon al ŝi.

"Mi ne prohibas, vi povas kuniri", respondas ŝi.

"La ĉielo disigas stelojn", li ekas la parolon. "Baldaŭ estos primavero, la botonoj ruĝos, diurno pli gajos kaj lidon li aŭdos. Sed nun turpas kaj tristas. Morna vespero.

"Jes", ŝi softas adaĝe, "estas jam tarde kaj tre sombre."

Liaj sinistra kaj dekstra manoj pendas pigre intren, kiam lante li diras: "kurta vivo estas Kaj dura, ĝi forcas turpan triston,... povron,... eĉ la vojo aspras..."

kaj la hundoj hojlas, nekompreneble modernan Esperanton.

A.S.

Ni gratulas: Marie Bohumská kaj Vlastimil Kočvara geedziĝis en Ostrava la 1-an de oktobro 1960. Ni ĉiuj deziras al ili sukceson kaj feliĉon en ilia venonta kunvivado.

NUNTEMPA BULGARIO monata kultura revuo estas el la plej belaj esp. gazetoj. Presita sur luksa papero kun multaj, parte koloraj iluatraĵoj, varia enhavo en kiu estas dediĉita ankaŭ sufiĉe da loko por la informoj el la mondo esperantista.

Abonu ĝin por jaro 1961 ankoraŭ hodiaŭ! Tutjara abonpago kostas Kĉs 12,-. La abonpagojn kolektas ĉefdelegito de UEA - Jar. Šustr, Dlouhá 10, Praha 1.

NI FUNEBRAS:

La 22-an de aŭgusto 1960 droniĝis en rivero Vltava, helpante al la aliaj fervora esperantisto, studento de medicino Jiří NOVÁK el Praha. En aĝo de 21 jaroj li estis unu el la plej realaj esperoj de nova junularo en EKP.

En Karlovy Vary mortis la 24-an de 3septembro 1960, 75-jara samideano, membro de Esperantista Klubo en Praha, František SKŘIVÁNEK. Li estis kremaciita la 27-an de sept.en Karlovy Vary. Plue ni sciigas, ke en Ostrava-Kunčice mortis inĝeniero Vladimír CHOBOLA, teknika oficisto, membro de nia klubo.

La 15-an de oktobro 1960 mortis juna, 19-jara samideano Václav Zdeněk MIKULECKI el Řepov apud Mladá Boleslav. S-ano Mikulecký estis bona esperantisto kaj membro de Esperantista Klubo en Mladá Boleslav. En la nomo de Esp. Klubo en Mladá Boleslav adiaŭis kun li s-ano Líhař.

BIBLIOTEKON DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

vi povas viziti ĉiu vendrede de la 16-a ĝis la 18-a horoj. Ne regule ĝi estas vizitebla preskaŭ ĉiutage, laŭ la libera tempo de niaj helpantoj.

DEZIRAS KORESPONDI

JUGOSLAVIO:

- = ZVONKO HERZL, Aleksandrovac, z.p. Veliká, Slavonia, instruisto, interŝ. PM k. ĉiuj landoj.
- = OTAŠEVIĆ DJOKA, "Timočanka", Zaječar, postfako 25, k. fotoam. el norda Europo.
- = HADŽAR ESAD, Zenica. Moše Pijade 10, 25-jara, tutmonde per bildkartoj.
- = JORDANKA LIKOVAC, Rade Končara 20, Vukovar, 17-jara lern., kor. kun ĉ.l.
- = MILICA RAĐOŠEVIĆ, St. jepana Supa^ca - 15, Vukovar, 17-jara lern., kor. k. ĉ.l.
- = MILOŠ CJEVIĆ, Kuršumlija, ul. 16-og februara 47, NR Srbija, 25-jara tekni- kisto kor, k. gejun. pri tekniko, filmoj kaj interŝ. bildkartojn.
- = PUHALO ANICA, Borovo, 18. domka broj 7 komencanto. kor. kun la tutá mondo.
- = HERIC ALEKSIJA, Borovo, VI. jaro jn br. 602, komene. koř. kun la tutá mondo.
- = BARAC MIRKO, Vukovar, I.G. Kovačiča 45 komenc. kor. kun la tutá mondo.
- = 3REDOJEVIĆ NEBOJŠA, Borovo, Borovská cesta 24, komenc. kor. k. la tutá mondo.
- = KRSTIĆ DORDE, Borovo, Borovo selo, Glavna ul. 169, kor. kun la tutá mondo.

POLLANDO:

- = JADWIGA KLUKACZ, Volomig. k/W-wy, str. Warszawska 21 itó, kor. pri ĉiuj temoj.
- = MARIAN RACZINSKI, Warszawa 55, PlxPr- zymierza 5@2, 27-jara, kor. pri legera musiko, filmo, teatro, ludas akordionon.
- = BAKLARZ KAROL, Miedzianka 66,- P-ta Janovice Welkie. Pow. Jelenia Góra; deziras interŝ., kor.

RUMANUJO:

- = Inĝ. Stefan MIHAI, Str. Dorobanti 556, Braila, deziras korespondi.

SOVETUNIO:

- = I. ANDRONOFF, Juri Vencliu 46, Burgas, interŝ. PM - neuzitajn.
- = ROMANJUK MIITRIJ, Stanislav, p/fc 222, USSR, studento de medicino, interŝ. fakajn libr., ĵurnalojn, PK kaj PM.
- = THEODOR PENT, Vabaduse 10-2, Kivioli, Estonio. kor. kun c. l., inters. PM k. PI.
- = MEIDA AGURAIUJA, Luha 15-2 Tallin, Estonio dez. kolekti k. inters. artbildajn poŝtkartojn.

SVEDUJO:

- = ERBOM GUSTAF, Gotgatan 92 A5, Stockholm So, kor. pri la homoj, landoj, ling- voj, vojaĝoj k.a.

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo en Praha ĉe Kultuceentro de ONV Praha 1, eldonas: Kulturcentro ONV 1. Respondeca redaktoro: J.M. Havlík, Plamínkové 12, Praha 7, tel. 75657.